

★ *Ora Ĵurnalo*

Numero 5, marto 2018

Al la tuta mondo:

*Bonvenon al la **verda** Gotenburgo !*



*Memore al Raoul Wallenberg 1912–1952
(Haga Kyrkoplan, Gotenburgo)*

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org



Espe-Porko dankas pro reagoj!

Det är en ära att finnas med i er tidning.

Evert Svensson

Imponerande arbete ni gör. Och ambitiöst!

Bengt Åradsson

Hjärtligt tack för Ora Ĵurnalo.

Bertil Nilsson

Hej och tack! Ni göteborgare är duktiga!

Sten Svenonius

Saluton. Amuze, ke vi ŝatus havi mian etan artikolon en via bela gazeto. Mi ankaŭ sendis

ĝin al la ĵurnalo Kvällsstunden. Mi esperas ricevi ĝin tie. Ju pli da homoj, kiuj legos pri ESPERANTO des pli bone. Legis Ora Ĵurnalo:n mallonge. Ĉu tiam elekti kion mi pensas estas la plej facila.

Gunnel Nilsson i Älvsbyn

Mi dankas por la revuo kiun vi kunsendis, ĝi estas tre bona!

Leif Holmlund

Membrigu en Ora Klubo, pagante 100 SEK jare al la Esperanto-Societo de Gotenburgo al pg 4 36 12 – 1. Bv skribi: Membro de Ora Klubo 2018.

Enhavo

Paĝo

- Espe-Porko dankas pro reagoj!
Enhavo.
- Kaŭze de la Tago de la Gepatra lingvo la Esperanto-Societo de Gotenburgo havis ekspozicion en la biblioteko de Majorna.
- Apropo "Modersmålets dag" 21 februari skriver Folke Wedlin med Göteborgs-Posten som mottagare (tror du den togs in?).
- La malvarmo en grandaj partoj de Eŭropo.
Anekdotoj (el 1904).
- La 3an de marto la nova biblioteko en Gråbo estis malfermita. Ĝi situas en unu el la novkonstruitaj domoj.
- Esperanto-Sabato la 3an de marto – prelego pri stenografio.
- Saluton el 2750-jara Samarkando!
- Påskvecka med kurs på Esperanto-Gården i Lesjöfors – Värmland.
Musik och kulturfestival i Lesjöfors 13–19 juli 2018 på Esperanto-Gården + Folkets Hus m.m.
Planera din hösts aktivitet 2018.
- Välkommen till Esperanto-Gårdens kooperativ i Lesjöfors.
Aprila kursaro en la franca E-kastelo Grésillon.
Sommardagar i Göteborg – pröva en intensivkurs i Esperanto 2018.
- Från Piteå tidning 2016: Älvsbylottornas esperantocirkel fick celebret besök.
Filozofiaj pensoj.
- Vår svarta katt – Nia nigra kato.
- Katoj en la kulturoj.
La ŝipkato.
- Siriaj popolfabeloj en la araba kaj la sveda.
- Fama kato, priskribita en Göteborgs-Posten la 18an de februaro 2018.
- Ingrid Näsholm: Katoj estas por mi gravaj.
- Printempo venas.
- Konataj personoj de Svedio.
- El ĵurnalo GP: Intensiĝinta maltrankvilo en la juda kongregacio.
El "Zamenhofstrato".
- Folke Wedlin: Ture Sventon i Warszawa (forts.)

Kaŭze de la Tago de la Gepatra lingvo la Esperanto-Societo de Gotenburgo havis ekspozicion en la biblioteko de Majorna

La 21an de februaro Inga, Monica, Margareta kaj mi deĵoris ĉe esperanta ekspozicio en la gotenburga biblioteko de Majorna. Bedaŭrinde ni forĝesis fari fotojn, sed Interrete ja troviĝas fotoj de la lokaloj. En dek nigraj tabuloj ni havis informon pri nia lingvo kiel ponto inter naciaj lingvoj. Ankaŭ estis

informo pri la strukturo de Esperanto kaj la uzo de la lingvo. Inga, kiu tre interesiĝas pri diversaj lingvoj, donis al la vizitantoj slipojn sur kiuj ili skribis kutimajn vortojn en siaj gepatraj lingvoj. Ŝi kolektis vortojn en multaj lingvoj sur slipoj kiujn ni en venonta Esperanto-Sabato tralegos kaj diskutos.



Ni kolektis kelkajn vortojn el diversaj lingvoj sub la rubriko **Mitt modersmål – Mia gepatra lingvo**.

Ne venis multaj dum tiu ĉi merkreda vespero sed ni ricevis kelkajn interesajn kontribuojn.

Unue – **la germana**

Auto = *aŭto*

Bald = *baldaŭ*

Erde = *tero*

Jahr = *jaro*

Nuhr = *nur*

Tag = *tago*

Due – **oroma**. La oroma lingvo estas parolata en Etiopujo.

Abba, Pappo = *patro*

Admyre = *kato*

Hadha, momma = *patrino*

Shona estas bantulingvo parolata de pli ol 80% de la enloĝantoj en Zimbabvo (ĉirkaŭ

6 225 000 personoj, laŭ SIL International 1989). Ankaŭ ties popolo nomiĝas shona.

Baba = *patro*

Chete = *nur*

Gore = *jaro*

Kiti = *katt*

Mai = *patrino*

Manje = *baldaŭ*

Mota = *aŭto*

Mwana = *infano*

Setso = *kulturo*

Zuya = *tago*

La estona

Ema = *patrino*

Isa = *patro*

Kass = *kato*

Laps = *infano*

En Brazilo oni ĉefe parolas **la portugalan**

Gato = *kato*

Mãe = *patrino*

Legal = *laŭleĝa*

La persa

نی‌ماش = *aŭto*

ی‌بزود = *baldaŭ*

سال = *jaro*

گرهه = *kato*

فقط = *nur*

روز = *tago*

ی‌گو = *terglobo*

Apropå "Modersmålets dag" 21 februari skriver Folke Wedlin med Göteborgs-Posten som mottagare (tror du den togs in?)

Språk är nyckeln till gemenskap mellan människor. Språk är också en port till kunskap i vidaste bemärkelse. Världens utveckling hänger intimt samman med kommunikation av olika slag, och all kommunikation bärs ytterst av språk. Men språk är också bärare av kulturell och nationell identitet. Det folk som får andra

folk att använda dess språk, har också skaffat sig makt över andra.

Ovanstående och liknande tankar var utgångspunkt för L. L. Zamenhof när han 1887 gav ut "Unua libro" (Första boken), där han beskrev sitt försök till ett brospråk mellan

folken. När senare de som lärt sig det nya internationella språket och entusiasmerats av dess genialiska konstruktion samlades till sin första världskongress i Boulogne-sur-Mer i Frankrike 1905, diskuterade man, om Zamenhofs språk skulle kunna förbättras ytterligare, men man konstaterade att det varken var nödvändigt eller önskvärt, och knappast ens möjligt.

I över hundra år har esperanto genom sina utövare visat hur väl det fungerar i alla sammanhang: muntligt såväl som skriftligt, i

prosa såväl som poesi, till vetenskapliga arbeten, i juridiska avtal, filosofiska framställningar, protokoll, affärskontakter etc. etc. Det existerar även andra planspråk (konstgjorda språk), men inget av dem har tillnärmelsevis lika många användare som esperanto.

Zamenhofs tankar är i dagens värld, med våra elektroniska medier, än mer aktuella än i slutet av 1800-talet. Med ett neutralt språk kan man mötas på lika villkor. Esperanto tillhör inget enskilt folk och kan därför vara allas språk; ingen

får någon fördel framför andra på grund av sitt modersmål – det är tanken.

Av världens cirka 6000 språk försvinner idag ett varannan vecka, statistiskt sett. De stora kolonialspråken tar över i kraft av sin glans och status; de dödar således andra språk, och med varje språk som dör, dör också ohjälpligt en kultur som, medan den levde, bidrog till mångfalden i världen. Esperanto innebär en möjlighet – sannolikt den enda möjligheten – att rädda den kulturella mångfalden.

Sveriges största språk

- | | |
|----------------------|--------------------------------|
| 1. Svenska 8 000 000 | 14. Arameiska 52 000 |
| 2. Finska 200 000 | 15. Turkiska 45 000 |
| 3. Arabiska 155 000 | 16. Albanska 39 000 |
| 4. BKS 130 000 | 17. Thailändska 30 000 |
| 5. Kurdiska 84 000 | 18. Ryska 29 000 |
| 6. Polska 76 000 | 19. Ungerska 24 000 |
| 7. Spanska 75 000 | 20. Kantonesiska 20 000 |
| 8. Persiska 74 000 | 26. Svenskt teckenspråk 12 000 |
| 9. Tyska 72 000 | 29. Romani 11 000 |
| 10. Danska 57 000 | 39. Samiska 6 000 |
| 11. Norska 54 000 | 54. Jiddisch 3 000 |
| 11. Engelska 54 000 | 66. Älvdalska 1 900 |
| 13. Somaliska 53 000 | 69. Överkalixmål 1 600 |

Statistiken visar uppskattat antal modersmålstalare 2012. I siffrorna för finska ingår meänkieli. BKS står för bosniska, kroatiska, serbiska och montenegrinska. Källa: Mikael Parkvall *Sveriges språk i siffror* (Morfem och Språkrådet 2016).

La malvarmo en grandaj partoj de Eŭropo

Kiam mi skribas jenon estas la 1a de marto. Kutime Gotenburgo havas "ĉiun duan tagan veteron". En unu tago neĝas, en la sekva estas plusgradoj. Sed nun dum pli ol unu semajno ni havis stabilan veteron – ĉirkaŭ 10–12 gradojn kaj foje sunon.

La gotenburga ĵurnalo G.P. raportas ke

❄ En Pollando kelkaj ŝatas iri sur glacikovrita lago Zalew Zegrzynski en centra Pollando – aliaj preferas malvarman banon (la bildo).



❄ Pli ol 24 personoj mortis dum la pasintaj kvin tagoj en Pollando, Rumanio, Francio, Ĉeĥio kaj Italio laŭ BBC. Bedaŭrinde mi povas aldoni unu personon el Svedio, hodiaŭ.

❄ Sur la Sankta Petro-placo pastroj ĵetas neĝbulojn. Oni tie havas la unuan neĝon dum ses jaroj.

❄ En Rumanio oni admonas homojn helpi handikapulojn kaj ebriulojn.

❄ En Rusio turista boato estas fikse frostigita sur rivero proksime al Kremlo.

❄ En Anglio kuraĝaj homoj naĝas en golfo ĉe Tynemouth. Oni nomas la nunan veteron: La monstro de la oriento.

❄ La Ruĝa Kruco malfermis tranoktejojn dise en Eŭropo.

❄ Sur la ski-itinero por la Vasa-konkurso oni devas forigi parton de la neĝamaso. Aliajn jarojn oni devis uzi neĝkanonojn, ĉar mankis neĝo. La unuan dimanĉon en marto ĉiam okazas la Vasa-

skikonkurso memore al du skiantoj kiuj volis ke nia reĝo Gustavo Vasa (1496–1560) ne iru al Norvegio, post kiam li sen sukceso admonis la virojn en Dalekarlio marŝi al Stokholmo por forpeli la danan reĝon Kristian II, kiu okupis Stokholmon. La skiantoj atingis la reĝon je Sälen kaj igis lin reiri al Mora, ĉar nun la dalekarlianoj pretis batali, post nova informo pri la krueleco de la dana reĝo. Memore al tiu okazo (kiun oni ne certas ke ĝi vere okazis) oni ĉiun jaron havas skikonkurson inter Sälen kaj Mora. Miloj da skiantoj startas samtempe.

Anekdotoj

MODESTE. – La redaktoro: "Kiel vi nomiĝas?"
La juna verkisto: "Mi ankoraŭ ne havas nomon."

LAŬVORTE. – La buĉisto: "Kial vi tiel rigardadas min?"

La servistino: "Nu, mia mastrino petis, ke mi informiĝu, ĉu vi havas porkopiedojn."

MALICE. – Li: "Mi bezonas paroli nur kvaronhoron kun fraŭlino por ke mi sciu, kion ŝi pensas pri mi."
Ŝi: "Tio devas esti tre malagrabla por vi."

PRO LA SOLA FOJO. – A: "Do mi estas mensogulo?"

B: "Male, amiko. Vi ĝuste nun diras la veron!"

La 3an de marto la nova biblioteko en Gråbo estis malfermita. Ĝi situas en unu el la novkonstruitaj domoj.



La komunuma ĉefkonsilisto Lill Jansson inaŭguras la novan bibliotekon en Gråbo.



Homoj formas ĉenon. La lasta libro de la malnova biblioteko venas el mano en manon kaj laste atingas la novan bibliotekon.



La bibliotekisto sidas en cirklo de balonoj.




Antaŭ ol la "granda invado".



Esperanto-Sabato la 3an de marto

Andreas rakontis pri **stenografio**.



La vorto stenografio mem venas el la greka stenos, kiu signifas mallarĝa, kaj grafein, skribi, do mallarĝa skribo. Antaŭ ol troviĝis aparatoj por registri sonojn stenografio estis la nura maniero registri spontanee parolon. Nun ni ja povas registri parolojn, sed stenografio ankoraŭ estas helpilo, ĉar kiel facile oni povas trovi certan parton de la parolo en sonregistraĵo? Stenografio ankaŭ estas bona helpo ĉe propra notado, verkado ktp. Ĝi ne nur estas pli rapida, sed ankaŭ malpli laciga por la mano ol skribo de ordinaraj literoj.

4.42	—	es	[86	Λ	erat
43	—•	est	87	Λ	fuit]
44	—	esse	5.4	Z	4 plus
45	—•	essaet	5	Z	plurculum
46	—•	essem	6	Z	plurimum
47	—•	essent	7	Ɔ	quamplures
48	—•	essemus	8	Ɔ	hic

Notoj de Tiro


La unua stenografia sistemo, kies uzo vastiĝis estas la t.n. notoj de Tiro. Ili estis sensistema kolekto da mallongigoj formitaj de la ordinaraj literoj, kiuj estis uzataj en la antikveco. La unua parolado kiu estis stenografiita estas laŭdire la parolado de Cato la plijuna en la senato kontraŭ la

ribelanto Catilina en la jaro 63 a.K. La sistemo evoluiĝis dum la tempo kaj estis uzata ĝis en la mezepoko. Fine la sistemo ampleksis 13.000 signojn. Antaŭ ol ekzistis krajono kaj papero oni stenografiis per grifelo sur vaksumitaj lignotabuloj.

Nur en la dek sesa jarcento novaj stenografiaj sistemoj estis evoluitaj, tiam en Britio. Oni kutime distingas inter tri skribtipoj: ideoskribo (ideografio), kie ĉiu signo reprezentas unu nocion, vortoskribo (logografio), kie ĉiu signo reprezentas vorton aŭ morfemon, kaj sonskribo (fonografio), kie unu signo reprezentas unu sonon en la lingvo. Ĉiuj modernaj stenografisistemoj estas sonskriboj, fonografioj, ofte parte kun vortoskribo, logografio. La sistemo de Bright el 1588, troviĝas meze de tiuj konceptoj. La bazo estas 588 vortosignoj. Por la resto de la vortostoko oni uzas signon por la unua litero de la vorto plus vortosignon por sinonimo. La t.n. pirateldonoj de la verkoj de Ŝekspiro estis eldonitaj helpe de la sistemo de Bright. Pirataj stenografiistoj notis senpermeso la tekston dum la teatraj prezentadoj. Oni poste nuntempe komparis tiujn eldonojn kun la originaj manuskriptoj de Ŝekspiro kaj povis konstati miskomprenojn pro tio, ke la stenografo forgesis skribi ekz. la signon por *ne*.

Pli frue oni kontentiĝis per resumo pri kio estis diskutata en la parlamentoj, sed poste ekestis bezono havi laŭvortajn notojn pri la diskutoj, kio metis pli grandajn postulojn sur la stenografiajn sistemojn. Oni transiris al la fonografia, sonskriba, tipo. Unue oni kontentiĝis per signoj nur por la konsonantsonoj. Oni signis la vokalojn simbole aŭ nur ĉebezone per kromsignoj, ekz. punktoj, ekster la vortobildo. Ekz. la usona sistemo Pitman el 1837 estas tia sistemo. La sistemo de Shelton, Britio 1626, estas t.n.


enhavas komputilan kapablon kaj povas prezenti la stenografajon en normala teksto.



Stenotipa klavaro

Stenografio kompreneble ankaŭ troviĝas por Esperanto. La plej grandaj stenografiaj sistemoj estas ankaŭ adaptitaj por Esperanto. Ekz. Unesteno, kiu estas konstruita baze de ido de la sistemo de Gabelsberger, kaj Esperanta Stenografio, kiu estas bazita de la franca sistemo Duployé. En Svedio troviĝas variaĵo de la Melina sistemo por Esperanto. Tamen Arends ne havas esperantoversion. La internacia ideo en Esperanto ankaŭ havas ekvivalenton en stenografio. La germanaj fratoj Kunovski lanĉis en 1893 stenografion, kiu jam komence estis kreita por esti uzbla

en pluraj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Esperante ĝi nomiĝas Internacianal-stenografio. Lasttempa inventisto de internacia stenografio estas nia Martin Strid. Sian sistemon li nomis Langolaj minuskloj. Li iris pli longe ol la kunovskiaj fratoj dirante, ke en lia sistemo troviĝas signoj por la sonoj de ĉiuj lingvoj de la mondo. La demando estas ĉu tia sistemo estas bona. La sistemo de la fratoj Kunovski sukcesis vastiĝi sufiĉe, sed por ke stenografia sistemo estu efektiva, ĝi devas esti kreita, aŭ adaptita, por tiu lingvo, kiun oni uzas. La plej efektivaj signoj devas esti rezervitaj por la plej oftaj sonoj de la koncerna lingvo.



Langolaj minuskloj

Saluton el 2750-jara Samarkando!

Karaj amikoj, samideanoj, kolegoj,

Printempo estas ĉi tie kaj baldaŭ, la 21-an de marto, venos Naŭruz, orienta Novjaro, unu el la plej belaj kaj ŝatataj festoj en Uzbekistano kaj pluraj aliaj landoj. Ni kredas, ke dum tiu ĉi festa sezono vi ĝuas renovigitajn esperojn kaj revojn, same kiel agrablajn rememorojn pri la pasintaj celebraĵoj.

Naŭruz (signifanta 'Nova tago') estas popola simbolo de vekiĝanta naturo, printempo, bono, paco kaj nova vivo. Menciindas, ke Naŭruz-festo estas enskribita sur la Reprezentan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro. [...]

Akceptu niajn elkorajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de alvenanta Naŭruz! Fartu bone kaj havu agrablajn printempajn tagojn plenajn je natura vekiĝo, fruktodona

renoviĝo, blua ĉielo, birdaj kantoj, florantaj ĝardenoj, malavaraj sunradioj, ridetoj...!

Ni kore deziras al vi, viaj familianoj kaj al ĉiuj niaj samesperantujanoj kaj samteranoj belan Naŭruz-feston, bonan kaj agrablan novan jaron en sano, bonhumoro kaj feliĉo! Ni volus dividi kun vi ĝojon de renaskiĝo de vivo, suna varmo, hela espero, amo, paco, amikeco kaj kreiva inspiro.

Ĉiu tago de via vivo estu kiel Naŭruz!

Geografie malproksime, sed Naŭruz-feste proksime via,

Anatoli Ionesov, kunordiganto de la projekto Klubo de Interpopola Amikeco "Esperanto"
P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando,
respubliko Uzbekistano. Retpoŝto:
imps86@yahoo.com

Påskvecka med kurs (B) Esperanto-Gården i Lesjöfors – Värmland

(A) 23–26/3 Diskussionstema: När dåtiden var framtiden... esperanto ur historiskt perspektiv. Dåtidens info användbar i nutid?

(B) 27/3 – 2/4 Esperantokurs, möjligheternas språk. 5 lektioner per dag + övningstid i 6 dagar. Från 0 till 90–95% förståelse av vardagsesperanto = internatelev.

Roligare att lära tillsammans... finna nya vänner – sjunga och le, mötas öga mot öga i Färöisk dans.

Intresserad – önskar du mer information och priser sänd ett mail – notera (A), (B), (AB) så sänder vi uppgifter till dig.

Välkommen till vårt kooperativ egarden@esperanto.se

Musik och kulturfestival i Lesjöfors 13–19 juli 2018 på Esperanto-Gården + Folkets Hus m.m.

Vid 1998 års KEF-festival deltog ca 200 personer från 20-talet länder. År 2003 deltog ca 380 personer från 30-talet länder.

Esperanto, ett levande och mycket användbart språk – googla själv på esperanto.org. Mycket musik och annan information finner du på youtube exempelvis.

Ĉu vi volas danĉi en granda rondo, Inter homoj de la tuta mondo.... ?

<https://www.youtube.com/watch?v=N18hzOTEVfk>

Planera din hösts aktivitet 2018

Studera **tre** veckoslut – först väljer du att delta i någon av introduktionskurserna. Vår förhoppning är att du får blodad tand och

sedan anmäler dig till fortsättningskurs A och därefter även avslutningskursen B.

Introduktionskurs, välj helg: 10–12, 17–19 eller 24–26 augusti.

Fortsättningskurs A 7–10 september.

Avslutningshelg/kurs B 21–23 september.

Från 0 till 90–95% förståelse av vardagsspråket i esperanto*. Tack vare den unika studieplanen som ger eleven möjlighet att efter varje dubbellektion få 60 min. för kaffe och noteringstid. Du får enklare texter, en del med bilder för att läsa hemma och bygga upp ditt ordförråd under icke kurshelg.

*) Är det möjligt att lära sig detta? Ja, tack vare esperantos logiska struktur!

Enligt Dr. Mario Pei, professor, italiensk-amerikansk lingvist samt polyglott vid Columbia Universitet New York, USA, är konstruerade språk överlägsna de nationella när människor från många språkområden möts, därför att språken är skapta för att underlätta inlärandet och användandet. Alla har någon av fördelarna...

Esperanto har lyckats förena samtliga: logisk grammatik, standardiseringen, ordvalet (bildandet av ord), neutraliteten och fonetiken (ljudenligt).

Mångspråkig lärare höll kurs

LESJÖFORS. Arnulf Naif var lärare vid Esperanto-gårdens introduktionskurs i esperanto lördagen den 3 februari. Några nybörjare studerade esperanto enligt Zagreba Metodo vars kursbok finns på över 30 olika språk men inte på svenska. Några esperantister deltog för att se hur metoden fungerar. Eleverna fann esperanto mycket intressant, så undervisningen fortsatte på söndag.

Lärarens språkkunskaper kom till stor användning, då några elever hade arabiska som hemspråk. Förutom arabiska, esperanto och svenska talar Arnulf kurdiska, franska, spanska, ladino, portugisiska och engelska. Han återkommer för en kurs på Esperanto-gården under påskveckan, preliminärt 26 mars till 2 april.

FILIPSTADS
Tidning 6/2-2018

Välkommen till Esperanto-Gårdens kooperativ i Lesjöfors

Vi erbjuder vandrarhemsboende i 23 fyrbäddsrum, lokaler för kurs- och annan verksamhet, självhushållskök, bastu samt restaurangkök och matsal för 50-talet sittande gäster m.m.

Intressant? Kontakta oss för en diskussion – till budgetpris.



Aprila kursaro en la franca E-kastelo Grésillon

De la 20a ĝis 28a de aprilo 2018 okazos la 8-a staĝo PRINTEMPAS kun proksimume 40 partoprenantoj.

- Kurso A1–A2 gvidata de Marion Quenut (Tuluzo)
- Kurso A2–B1 gvidata de Christophe Chazarein (Tuluzo)
- Kurso B1–B2 gvidata de Zsófia Kóródy (Herzberg)
- Internaciaj KER-Ekzamenoj (27-28 aprilo)
- Prelegoj kun Nijole Stakeniene (Litovujo)

Bona etoso kaj bonaj manĝoj (viando aŭ vegetare).

Informoj: gresillon.org/printempas

Aliĝo: gresillon.org/aligho

Posta programo: gresillon.org/agendo

Somera programo: gresillon.org/somero

Ĝis baldaŭ en la franca Esperanto-kastelo Greziljono!

Jannick Huet – kastelo@gresillon.org



Sommardagar i Göteborg – pröva en intensivkurs i

Esperanto 2018

– ett logiskt och spännande språk med globala ambitioner.

Plats: Redbergsskolan. Grupper på tre olika nivåer.

Tid: må 25 – fr 29 juni 2018 kl. 10–15.

Sista dagen gör vi en utflykt och prövar att tala esperanto.

Avgift 100:–/dag = 500:– Pg 436 12-1



Arrangörer: Göteborgs Esperantoförening, Esperantolärarnas förbund ILEI och Studieförbundet Vuxenskolan.

Läs mer på Esperantoföreningens hemsida: www.esperanto-gbg.org

Mer info: Siv Burell 070-721 34 79

Från Piteå tidning 2016:

Älvsbylottornas esperantocirkel fick celebret besök

Ann-Louise Åkerlund från Helsingborg är vice ordförande i Svenska Esperantoförbundet, ordförande är Olof Pettersson i Stockholm. Ann-Louise, som i grunden är Piteåflicka, kom på semester till Norrbotten för att hälsa på släkt och vänner. Deltagarna i studiecirkeln uppskattade verkligen att hon offrade en hel dag på att besöka oss.



I cirkeln: Gunnel Nilsson, Carina Isaksson och Irene Johansson

Lottorna fick en hel del material av Ann-Louise, bland annat ett svensk-esperantiskt lexikon och ett läromaterial som heter Liza kaj Paŭlo. Där finns tecknade personer och under bilderna står vad de gör. Ett roligt sätt

att lära sig esperanto på, lite omväxling till glospluggandet. Deltagarna fick också många goda råd och tips av Ann-Louise. Sedan berättade hon att Karlskoga Folkhögskola under många år hade kurser i esperanto. Eldsjälen Lars Forsman ledde kurserna, men när han gick i pension var inte skolan intresserad längre.

Gunnel Nilsson

Cirkeln fortsätter med sina kurser. Gunnel skriver artiklar om esperanto och får in dem i flera tidningar. Grattis, Gunnel!

Tyvärr har den fjärde medlemmen, Bo Domander nyligen avlidit, så cirkeln har nu bara tre deltagare – men arbetar vidare för att sprida esperanto i våra nordligaste regioner.

Är den här cirkeln kanske Sveriges nordligaste esperantocirkel?

Vi i redaktionen för Ora Ĵurnalo skulle gärna vilja få berättelser om studiecirkelar i andra delar av Sverige.

Filozofiaj pensoj

Pensoj de biciklo:

– Degradita kiel florpoto!

Kaj pri rusto ankaŭ, neniu zorgas. Jen mi staras en malseka kaj malvarma vetero.

Krome la bicikla ĉeno longtempe ne estas ŝmirita. Eĉ la selo estas for.

Alie estis en malnovaj tempoj, kiam mi estis nova kaj brilis de kromo kaj ruĝa farbo.

Eĉ manbremson kaj postan reflektilon mi havis kaj fortaj kuroj pedalis min al grandaj aventuroj.





Vår svarta katt

Vår fina svarta katt
betraktar oss som gäster
här i vårt eget hus –
man ser på hennes gester.

Så välkomnande hon är var gång
vi återvänder hem igen,
så kelig är hon dagen lång
mot mig och favoriten Sven.

Hon jamar högt, vill komma ut
då öppnar vi förstås
men utelivet tar fort slut
hon ska ju vakta oss!

Mi ne pensas ke kato estas **ĝi**. Mi preferas **li** aŭ **ŝi**, se la kato estas familia membro.

Alicia estas "trovita" katino. Oni observis ŝin dum tri monatoj kiam ŝi serĉis manĝon apud la arbaroj de Härryda. Finfine oni sukcesis kapti ŝin kaj sendis ŝin al "kathotelo". Interrete ŝi estis vendita al virino en Lerum. La virino tamen malsaniĝis kaj ne plu povis zorgi pri la kato – do ni aĉetis ŝin.

Unue ŝi ne estis tre socia, sed de tempo al tempo ŝi pli kaj pli ŝatis kaj ŝatas homojn.



Nia nigra kato

Rigardas nin la nigra kat'
kiel gastoj en la dom'
tre fiera estas ŝia stat'
ŝi regas super ĉiu hom'.

Bonveniga estas ŝi
je nia reven' ĉifoje
karesema do al ni
prefere al Sven – tre ĝoje!

Kiam mjaŭas ŝi ĉe pord'
obeemaj estas ni
malfermas ĝin laŭ ord'
sed tuj al gard' revenas ŝi.

Katoj en la kulturoj

En la malnova Egiptio la kato estis sankta, kunligita kun Seth, la dio de la mallumo, Isis, la matrinodiino kaj la luna diino Bast. La greka-roma lun- kaj ĉasdiino Diana havis katon ĉe siaj piedoj. Same pri la roma libereca diino Libertas. Katoj estis la solaj bestoj, kiuj estis permesataj iri en la templan areon de Romo.

En Ĉinio la kato, kiu estas nokta besto, apartenas al Yin, la virina sfero.



Ĉi tie en la Nordio la fekundeca diino Freja iris en ĉareto tirita de du katoj. Kiam la kristanismo venis oni kondamnis tiun kredon. La kato fariĝis satana kaj reprezentis la

mallumon, malbonon, deziregon kaj pigrecon. Oni kredis ke la kato kuniris kun sorĉinistinoj – speciale se la kato estas nigra.

Ree en Egiptio

Je la venko de persoj super la egiptoj ĉe Pelusidus, la katoj havis grandan rolon. La persoj bone konis la egiptan honoregon de katoj kaj ĉiu persa soldato estis ordonita fiksi vivantan katon sur sia ŝildo. Do, la egiptaj soldatoj ne kuraĝis pafi siajn sagojn al la persoj, timante ke ili erare povus trafi la sanktajn bestojn. La rezulto de tiu milito estis ke Egiptio ne plu estis memstara, sed parto de la Persa regado, kaj poste provinco de la Romana Imperio.



La ŝpkato

skribita de Christin Granat, kiam ŝi havis 12 jarojn.



”Huŝ katino (kataĉo)! (For de tie ĉi!)”, diris la fiŝvendistino.

”Pli bone forkuri”, mi pensas, kaj subite mi troviĝas en la granda, novkonstruita ŝipo.

La reĝo Gustav II Adolf babilaĉis, ke la ŝipo nepre devas esti preta. Estas milito en Eŭropo.

Mi estas grimpinta sur la maston. La (mar)bordoj estas plenaj de homoj. Ĉiuj kuras tien kaj reen sube sur la ferdeko. Estas tute senorde (ĥaose).

”Bonŝance ke mi tamen eskapis la malafablan fiŝvendistinon”, mi pensas supre sur la masto.

Nun mi vidas altkreskan viron paŝantan en la direkto al la tripinta flago plej malantaŭe.

"Ĉiuj surŝipen! Malligu!" li kriegas super Stokholmon.

Mi ektimis tiel ke sur mi hirtigis la haroj tie kie mi estis sidanta. Tiam mi vidas ĉirkaŭ kvardek ŝipanojn alkurantajn.

"Aj, aj, kapitano Hansson!" unu el ili krias.

Subite venas puŝvento, kaj mi preskaŭ falas de la masto. Per ĉiuj fortoj mi min alkroĉas per la ungegoj, sed kapitano Hansson sukcesas stabiligi la ŝipon. Mi fartas malbone (sentas naŭzon) kaj sentas timon.

Nun ni estas sur vasta (libera) maro. Mi aŭdas ke la kapitano Hansson ordonas pri "Sveda signalvorto", kaj la kanonoj tondras kaj knalas.

Ŝajnas ke mi ne povas veni al la bordo. Certe mi devas fariĝi ŝipkato. Aĉa, malagrabra fiŝvendistino, mi ne volas iri al iu milito en Prusujo. Mi volas iri hejmen al Stokholmo, kie mi loĝas!

Nun venas nova puŝvento, kaj mi sidas ĉi tie sur la masto kaj alkroĉiĝas.



"Helpu, helpu! La tuta ŝipo renversiĝos, kaj kapitano Hansson jam falis en la akvon." Ĉiuj krias helpon.

Nun ĉio okazas rapide, kaj subite mi kuŝas en la akvo. Hu! Fi!

Sed ĉi tie venas tabulo flosanta. Mi devas provi grimpi sur ĝin.

Sed sur kio mi sidas? La tabulo havas orelojn, ĉapelon kaj buŝon. Mi vere ektimas.

Poste mi komprenas, ke estas ligna figuro, kiu malfiksiĝis de la ŝipo.

Estas bonŝanco por mi! Mi sidas sur la ligna figuro kaj flosas en la direkto al la bordo.

Ĉiuj krias kaj surtere kaj enakve, ke Vasa estas subakviĝanta. Kiam mi rigardas, preskaŭ tuta la granda ŝipo estas sub akvo.

La ligna figuro kolizias kun granda ŝtono ĉe la bordo. Mi saltas sur la teron kaj rapidegas hejmen al Stokholmo.

Tian aventuron mi spertis!

Miaŭ!

Siriaj popolfabeloj en la araba kaj la sveda

Mi demandas al mia amiko Wafa, 24-jara refuĝinto el Idlib, Sirio, ĉu li memoras iun fabelon de sia infanaĝo.



Li rakontas:


Estis ŝafino kiu havis tri ŝafidojn. Unu tagon ŝi devis foriri de la domo kaj ŝi admonis la ŝafidojn: "neniam enirigu fremdulon, ĉar povus esti la lupo. La ŝafidoj promesis tion, kaj la patrino foriris.

Post nelonge iu frapis al la pordo. "Kiu estas vi?" la ŝafidoj demandis. – " Mi ja estas via patrino", iu respondis. "Ne, via voĉo estas raŭka kaj ne similas al tiu de nia patrino" diris la ŝafidoj – kaj la lupo foriris.

La lupu trejnis uzi pli molan voĉon kaj post iu tempo ĝi denove frapis al la pordo. "Kiu vi estas?" demandis la ŝafidoj. Per mola voĉo la lupu diris: – " Mi ja estas via patrino". La ŝafidoj malfermis la pordon kaj ---- la lupu formangis la tri ŝafidojn.

Kiam la ŝafino revenis al sia domo ŝi trovis la pordon malfermita kaj la lupon dormanta kun

granda stomako. Ŝi tuj prenis tranĉilon kaj per ĝi malfermis la stomakon de la lupo – kaj la tri ŝafidoj elsaltis. Granda feliĉo! Fino!



Mi ne scias la daŭrigon, sed certe la vivo de la paro tre ŝanĝiĝis. Ĉu vi, leganto, scias?

Nek mi, nek Wafa scias kio okazis al la lupo. Ŝajne ĝi mortis. Ĉu vi scias?


Multaj el la arabaj rakontoj estas nur buŝe transigitaj. Wafa diras ke li ne memoras

